



# INTERNACIA LERNEJA ESPERANTO REVUO

Ni kongresis  
en Pekino!

paĝo 5





Āra: 10 ft.

Nemzetközi  
eszperantó  
diáklap

Megjelenik  
évente háromszor

XIII évfolyam  
86/3 szám

Felélős szerk.:  
Princz Oszkár

Kiadja  
a Magyar  
Eszperantó  
Szövetség  
Budapest  
Kenyérmező u. 6.  
1081

Felélős kiadó:  
Vaskó Tibor

Készült a  
MESZ  
Sokszorosítóban  
hearota 86-0095

Kiad. eng. sz.:  
III/IFJ/30/1976.

ISSN  
0230-1318

\*

TASKO  
DE ĈIU  
ESPERANTISTO:  
PROPAGANDI  
LA REVUON  
INTER LA  
KOMENCANTOJ!

JUNA AMIKO, revuo por lernejanoj kaj komen-  
cantoj. Aperas trifoje jare. Redaktoro kaj grafika  
aranĝanto: Stefan MacGill, Füredi u. 52 IX 110,  
H-1144 Budapest, Hungario. Abonoj: en la social-  
ismaj landoj ĉe respektivaj landaj asocioj aŭ kon-  
cernaj kompetentaj instancoj, en aliaj landoj ĉe  
UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam,  
Nederlando. Prezo por 1986, 5,70 gld.

Nur en esceptaj okazoj devas la respon-  
deca redaktoro sin montri antaŭ la  
publiko. Nun estas ĉi tiu okazo. Por la  
revuo *Juna amiko* estas samtempe agrab-  
la kaj malgrabla momento. Malgrable,  
ĉar ni devas adiaŭi redaktoron, kiu  
multon faris, kaj agrable, ĉar sen inter-  
rompo daŭros la redaktado kaj la aper-  
ado.

Antaŭ du jaroj, post longtempa dorm-  
ado, revekiĝis la tamen prestiĝa revuo  
*Juna amiko*, dank' al la nova redaktoro  
Oldřich Kníhál. Energie li transprenis  
la taskojn kaj post mallonga tempo,  
ekde februaro 1984, denove ĝustatempe  
aperis la revuo. Abonantoj, kiuj jam  
opiniis mortinta la revuon unu post la  
alia revenis.

Zorgeme kaj varie li redaktis la  
revuon, iniciatis novajn rubrikojn kaj  
varbis novajn kunlaborantojn. Nun kun  
bedaŭro ni devas akcepti lian demision  
— pro profesiaj kialoj — sed feliĉe ni  
scias ankaŭ, ke li ne kabeiĝis, tamen en  
alia tereno de Esperantujo ni revidos  
unu la alian.

Oskár Princz

# Serĉo inter nuboj

Vi legis sur la antaŭpaĝo, ke via malnova amiko, s-ro Kníĉál, ne plu redaktos vian revuon *Juna amiko*. Do, la eldonantoj de la gazeto bezonas novan redaktoron. Sekve, ili ekserĉis. Ili serĉis sub la sep pontoj de Danubo, sur la belaj insuloj de Danubo, en montaj arbaroj kun abundo da nubo. Ili serĉis en magazenoj, sed trovis nur artiklojn, dum ili bezonas artikolojn. Ili serĉis en muzik-butikoj, sed trovis nur falsajn kantojn, dum ili bezonas verkantojn.

Fine de la tago ili revenis senespere kun kapoj klinitaj al la propra oficejo. Jen sur la tapiŝeto antaŭ la sojlo de la enirpordo ili trovis la apudan foton. Tio estas fakte logika loko por trovi tian foton, ĉar ĉiu scias, ke tia tapiŝeto estas por-treta.



Baldaŭ ili malkovris, ke tiu en la portreto estas 37-jara novzelandano. Dum dudek kvin jaroj li loĝis en tiuj foraj insuloj, kaj poste dum dek jaroj loĝis en Nederlando kaj laboris en la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio. Tie la oficistoj venas el multaj landoj kaj do ili parolas Esperanton dum la tuta tago!

Nun tiu portretulo loĝas en Budapeŝto, kie li silentas dum la tuta tago, ĉar li ankoraŭ ne kapablas paroli hungare. Do, li volonte iĝis redaktoro de *Juna amiko*, ĉar tiel li ne devos ĉiam silenti, sed povos paroli. Li povos paroli al vi ĉiuj tra la tuta mondo en Esperanto per *Juna amiko*. Sed li ne parolos senĉese! Li ofte silentos, ĉar estas plej bone, ke vi, la junuloj kaj infanoj, parolu rekte unu kun la alia, pere de niaj paĝoj.

Li ne multe ŝanĝos la revuon. Feliĉe, li ĝuos la helpon kaj kunlaboron de kolego Kníĉál. Plue aperos kantoj, fabeloj,

artikoloj kaj enigmoj (se vi daŭre sendos ilin!). Sed li havas ankaŭ kelkajn ideojn (neniu volas redaktoron sen ideoj!) Li prezentos regule amuzajn rakontojn, kiel ekzemple *La remboatoj* en ĉi tiu numero, kaj dialogojn, kiujn vi povas aktori, kiel ekzemple *Ĉu sufiĉis la informo?* ĉi-numere.

Pri liaj aliaj ideoj vi legos en estontaj numeroj. Se li prezentus ĉiujn el ili nun, ne restus loko por lia subskribo!

*Stefan MacGill*

86 09 30

Jen, sufiĉis la loko!

artiklo: varo, kiun oni povas aĉeti en granda butiko.

artikolo: rakonto aŭ raporto en gazeto.

eldonanto: asocio aŭ persono, kiu aperigas gazeton.

magazeno: granda butiko.

portreto: bildo aŭ foto de la kapo de persono.

sojlo: ligno-peco sur la tero ĉe porda enirejo.

treto: paŝo. La meto de piedo sur la teron aŭ plankon.

ver-kanto: kanto, kiu prezentas la veron. Mal-falsa kanto.

verk-anto: persono, kiu verkas artikolojn por gazetoj.

*Jen la jarkolekto de 1986 estas kompleta! Ankoraŭ nun eblas aĉeti la aperintan jarkolekton. Vi povas tion fari tra Universala Esperanto-Asocio, Nw, Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, por 5,70 gld. En socialismaĵ landoj turnu vin al via landa asocio aŭ al HEA.*

Ni jam preparas la novan jar-kolekton por la jubilea jaro. Kaj jen agrabla novaĵo: HEA decidis eldoni la revuon, ne tri-foje en la jaro sed kvar-foje. Tamen, tiu decido unue bezonas aprobon de oficialaj instancoj, do ni devas ankoraŭ atendi antaŭ ol akcepti abonojn. Ni informos vin per cirkulero kaj en aliaj gazetoj pri la nova ofteco kaj prezo de nia *Juna amiko!*



## Nia estis la plej granda!

La Universala Kongreso en Pekino surprizis ĉiun — ankaŭ la organizintojn. Neniu atendis tiel multe da kongresanoj! Aliĝis centoj ankoraŭ dum la kongresa semajno, kaj la fina sumo estis pli ol 2400 personoj. La kongreso en Pekino estis do la plej granda UK iam ajn ekster Eŭropo, pli granda ol tiuj en Tokio en 1965, Brazilio en 1981 kaj Vankuvero en 1984. Ĝi estis ankaŭ la plej granda internacia kongreso iam organizita en Ĉinio! Pli ol cent helpantoj venis el ĉiuj partoj de tiu giganta lando por helpi al la membroj de la Loka Kongresa Komitato. Ĉirkaŭ tri cent ĉinaj esperantistoj, multaj el ili junaj, sukcesis partopreni la kongreson. Multe pli da personoj lernas Esperanton en Ĉinio, en lernejoj kaj universitatoj. Jam pli ol 400.000, ili informis nin.

Gravaj estroj en Ĉinio ĉeestis la inaŭguron (vidu la foton supre) kaj parolis favore pri Esperanto: "Ĉinio povas kaj devas ludi pli grandan rolon en la disvastigo de Esperanto" diris unu el ili. La vic-prezidanto de la ĉina parlamento, Huang Hua,

akceptis kelkajn centojn da kongresanoj per luksa bankedo, organizita en la granda Popola Halo.

Poste dum la kongreso, Radio Pekino, kiu ĉiutage dissendas radio-programojn en Esperanto, aranĝis akcepton por siaj aŭskultantoj en ilia propra oficejo. Aŭskultantoj el multaj landoj salutis la kunvenon kaj la kolegojn de la Esperanta Fakto de la radiostacio. Sur la foto la raportisto de Pola Radio, s-ro Andrzej Pettyn, registras la salutojn al Radio Pekino.



Merkrede estis la ekskursita tago. La kongresanoj frue eniris busojn ĉe siaj hoteloj kaj loĝ-lokoj. Tiuj busoj ekiris ĝis iu punkto ĉe la rando de Pekino. Tie ili viciĝis en unu enorma serpenteca linio — ni konstruis nian propran grandan muron — el pli ol kvindek aŭtobusoj! Poste la polico preparis la vojon kaj la tuta karavano povis veturi senhalte al la montoj, kie troviĝas la Granda Muro. La busoj etendiĝis ĝis la horizonto antaŭ ni! Multaj homoj vizitis la muron; dum unu aŭ du horoj la kongresanoj promenis supren sur la dika ŝtona muro.


En la vesperoj okazis tre interesaj programoj. Ĉar Ĉinio estas tre ekzotika lando por la kongresanoj el aliaj kontinentoj, oni preparis por ni multajn spektaklojn pri la ĉina kulturo. En unu vespero ni ĝuis dancojn, akrobataĵojn kaj muzikon. En alia ni vidis kolorplenan kvin-aktan operon pri aventuroj sur la Silka Vojo, tiu fama vojo, kiu ligis Ĉinion kun Eŭropo kaj la Mez-Oriento, antaŭ centoj de jaroj. Okazis ankaŭ Junulara Vespero en kiu multaj centoj partoprenis. Ni renkontis junulojn

ne nur el Ĉinio, Koreio kaj Japanio, sed ankaŭ el kelkaj aliaj interesaj aziaj landoj, ekzemple el Pakistano kaj Irano. Ĉe-estis grupo de eble dudek irananoj, kaj ili instruis al ĉiu irananoj popol-dancon. Sur la foto vi vidas kelkajn el la junuloj dum tiu neformala vespero.

En la kongresejo oni organizis libroservon kaj tie multaj novaj ĉinaj libroj estis aĉeteblaj. Okazis kompreneble labor-kunsidoj. Ĉar la UK estas la kongreso de Universala Esperanto-Asocio, ĝia 80-kapa komitato kunsidis multfoje. Ĝi elektis novan estraron, kio estas grupo de naŭ personoj, kiuj gvidos la Asocion dum la venontaj tri jaroj. La nova prezidanto de UEA estas Humphrey Tonkin el Usono.

Post tiu sukcesa kaj nekutima kongreso, la esperantistoj nun faras planojn por ĉeesti mult-nombre la Universalan Kongreson en Varsovio en la jubilea jaro de Esperanto.

Teksto: smg; Fotoj: smg/ik.



En estontaj numeroj de *Juna amiko* ni prezentos artikolojn pri vojaĝado antaŭ kaj post la kongreso en Ĉinio kaj Mongolio.

## LA REM-BOATOJ



En nia urbo estas bela parko. En ĝi troviĝas montoj kaj arboj. Inter la arboj estas bela lago. Kiam la suno brilas kaj la ĉielo estas blua, multaj personoj vizitas la parkon. Kion ili faras en la parko? Ili ripozas kaj ludas. Apud la bordo de la lago troviĝas domo. Sed ĝi ne estas loĝ-domo. Ni paŝu al fenestro kaj rigardu en la domon... tie estas multaj boatoj... *rem-boatoj!* Ĉiu havas grandan ruĝan numeron sur la flanko. En la domo laboras du viroj, s-ro Remo kaj s-ro Kilo.

La personoj, kiuj vizitas la parkon, venas al la domo kaj ili ricevas rem-boaton. La du viroj *lu-donas* la rem-boatojn al la publiko — la personoj pagas monon al la viroj kaj ricevas la rajton remi sur la lago dum unu horo.

En bela tago, multaj personoj remas sur la lago. Sur la muro de la domo pendas granda horloĝo. Per tio s-ro Remo kontrolas la horon. Ekzemple, la familio en boato numero sep remis dum unu horo, do s-ro Remo rigardas la horloĝon, s-ro Kilo rigardas tra teleskopo kaj vidas boaton sep. S-ro Remo sonigas sonorilon, kiu pendas de la tegmento de la domo: BAM! BAM! BAM! BAM! BAM! BAM! BAM! Sepfoje li sonigas la sonorilon. S-ro Kilo krias,

"Boato numero sep, revenu al la bordo! Unu horo forpasis!"

La familio en boato sep aŭdas la sonorilon kaj la krion, kaj ili ekremas al la bordo, ili remas, remas, remas, remas,



ĝis ... BONK! ... la boato trafas la bordon. Ili redonas la boaton kaj hejmeniras, malsekaj sed kontentaj.

Unu tagon, la vetero ne estas bela. La suno ne brilas, estas multaj nuboj. Sur la lago kuŝas densa blanka nebulo. Malbona vetero por promeni per remboato, kaj malmultaj homoj vizitas la parkon. Sed kelkaj homoj estas strangaj! Jen venas unu familio. Ili luas remboaton kaj remas for de la bordo kaj baldaŭ ili malaperas en la nebulon.

Post unu horo s-ro Kilo rigardas tra sia teleskopoj. Li ne vidas remboaton. Sed jen, tra la teleskopoj, li vidas unu ruĝan numeron. Naŭdek unu. Li krias,

"Boato naŭdek unu, revenu al la bordo!" kaj li paŝas al la sonorilo kaj sonigas ĝin. BAM! BAM! BAM! BAM! Bam! Bam! Bam! bam! bam! bam, bam, bam ... "ho, mi laciĝas!" ... bambambambambam ... "ve, mia brako doloras!" ... bambambambambam ... "prefere ni aĉetu elektran sonorilon!"



Post du minutoj de sonorilado, s-ro Remo alvenas kaj frapetas la lacan s-ron Kilo sur la ŝultro.

"Sed, Kilo, kion vi faras?" li demandas, "Ni ne havas naŭdek unu boatojn! Ni havas nur dudek boatojn!"

"Ho, jes, vi pravas", diras Kilo kaj ĉesas sonigi la sonorilon. Li reprenas la teleskopojn kaj rigardas denove. Fine li komprenas, kaj li krias denove,

"Boato dek ses, ĉu vi havas problemon?!"

# LA KAMPARANO KAJ LA DIABLO

*Tralaboris kaj tradukis: Sándor Termes, Hungario.*

La kamparano trovis ŝtonegon sur la kampo. Nek li, nek lia ĉevalo povis formovi ĝin. La kamparano gratis sian kapon kaj ekĝemis:

"La diablo forportu ĉi tiun ŝtonegon!"

Tuj ekaperis la diablo!

"Vi vokis min kaj mi estas ĉi tie. Kion vi deziras de mi?"

La kamparano tre ektimis, sed tamen kuraĝe respondis:

"Forportu ĉi tiun ŝtonegon"

"Bone," murmuris la diablo, "kaj kion vi donos por mia servo?"

La ruza kamparano iomete pensis, kaj fine respondis:

"Vi rajtas ricevi de mi la rezultojn de du rikoltoj. Revenu post unu jaro, sed elektu nun, mia amiko. Kion vi deziras, ĉu tion kio produktiĝas sub la kampo, ĉu tion kio produktiĝas super la kampo?"

"Mi elektas tion, kio produktiĝas super la kampo," ridetis la diablo, "kaj post unu jaro mi alvenos por ricevi la promesitan rikolton."

La ruza kamparano plantis rapojn.

Post unu jaro ekaperis la diablo.

"Mi alvenis por la promesita rikolto. Kie mi trovas ĝin?" li demandis.

"Jen la folioj de rapoj. Forportu ilin, kiel vi deziris", flustris la hipokrita kamparano.

La diablo kolektis la foliojn de la rapoj kaj diris:

"Mi denove alvenos post unu jaro por la dua rikolto. Ĉi-foje mi elektos tion, kio produktiĝas *sub* la kampo."

La ruza kamparano plantis tritikon.

Post unu jaro ekaperis la diablo.

"Mi alvenis por la promesita ter-produkto. Kie mi trovos ĝin?" li demandis.


"Jen la radikoj de la tritiko. Forportu ilin, kiel vi deziris," ridegis la kamparano.

"Vi estas hipokrita homo," kriis la diablo, kaj li tuj reĵetis la ŝtonegon sur la kampon.

Eĉ ne la diablo laboras senpage!



Bildo: Pavel Rak



diablo: mal-dio (vidu la bildon)

elekti: decidi el inter du aŭ kelkaj eblecoj.

flustri: diri tre mallaŭte.

hipokrita: malhonestata.

kampo: ter-preco kie kamparano kreskigas plantojn.

murmuri: diri neklare per basa voĉo.

rapo: speco de planto kies radiko estas la manĝebla parto .

radiko: la subtera parto de planto.

tritiko: speco de planto kies radiko ne estas manĝebla.



## ELI URBANOVÁ

... naskiĝis la 8an de februaro 1922 en Časlav, Ĉeĥoslovakio. Sia unua poemlibro estis en la ĉeĥa lingvo. Ĝi nomiĝis *Spegulo* kaj aperis en 1940, dum ŝi studis en pedagogia instituto. Ekde tiam ŝi vivas en Prago. Sia posta ĉeĥ-lingva verko *Por ke ili estu homoj* aperis en du eldonoj (1975 kaj 1984). Ŝi esperantistiĝis en 1948. Sia unua Esperanta poemaro *Nur tri kolorojn* havis antaŭparolon de Gyula Baghy kaj aperis en 1960 ĉe la fama eldonejo Stafeto. La dua, titolita *El subaj fontoj* aperis en 1981 ĉe Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

La kolekto *Verso kaj larmo*, eldonita ĉe Iltis (Saarbrücken) en 1986 prezentas elekton el ambaŭ verkoj kaj ankaŭ ŝiajn plej gravajn tute freŝajn poemojn.

Kion diras aliaj kritikistoj pri ŝia poezio? Jen du opinioj:

"...eksonis ne malmultaj poetinaj voĉoj, sed nur Drezen, Boulton kaj Urbanová sukcesis riĉigi nian originalan poezion per novaj temoj, sentoj, motivoj."

Georgi Mihalkov, Bulgario.

"Ĉe Eli Urbanová mi admiras la forton, per kiu ŝi, kvazaŭ agrese, malkliŝe, senprude kaj sentabue — tamen ĉiam lirike — elverŝas sian animon kaj interpretas mondon kaj vivon."

Aldo de Giorgi, Italio.

Ŝi ankaŭ verkas por pli juna publiko. Jen tri belaj poemoj, kiujn ŝi kontribuis al *Juna amiko*:

## HUNDO

En la fenestron nokt' rigardas,  
la luno naĝas tra l'kurten',  
mi ĝian movon fide gardas  
kuŝante ĉe l'kamen'.  
Atente flaras mi al pord',  
murmure eĥas mia vort':  
Forrrrrr... de la dom',  
Forrrrrr... fremda hom',  
averton pri la mord'!

Orel' ekstaris enkontrolle:  
Ba, ĉie regas pac', kviet'.  
En hirtaj haroj nur petole  
kaŝ-ludas la pulet'.  
Suspekta son' el koridor'!?  
Revenas hejmen la sinjor'!  
Kaj sekvas boj'  
kaj granda ĝoj'  
laŭ ĝusta hunda mor'.



## MUĜETO

Sur dorso kun orkestro  
muĝeto post fenestro  
ĉiam ankoraŭ zumas  
senespere,  
dum ekstere  
tegmentojn sun' orumas.  
Sur travidebla tundra  
malgranda nigra punkto.  
Subite sin ekmovas  
labirinto — —  
Perdiĝinto  
vojon al suno trovas.

faŭko: buŝo de besto (sed ĉi tie  
figure uzita pri kurteno!)

flari: senti per la nazo.

gardi: protekti kontraŭ malbono.

heno: ĉevala krio.

hirta: rekte staranta.

kameno: tubo super fajro.

labirinto: loko kie estas malfacile  
trovi la vojon.

orkestro: muzikistaro.

orumi: kovri per oro.

pozo: maniero stari por esti admirata.

pirueto: turn-ira danc-paŝo.

pranci: elegante paŝi, kiel ĉevalo.

pulo: besteto, kiu vivas sur la haŭto  
de hundo.

tundra: vasta ebena loko.

zumi: fari sonon kiel abelo aŭ muŝo.

## CIRKA ĈEVALO

Parade ek! Trot'! Piruet'!  
Paŝiru! Pranc'! En ritma danc'  
laŭ la tamtam'! Antaŭen jam!  
Galop'! Kaj hop!

Adiaŭpoz'. Jetita roz'.  
La lasta hen'. Faŭk' de l'kurten'.  
Nu, sinjorin'? Tre dolĉa fin':  
Dank' per suker'.



ĈU LA  
INFORMO  
SUFIĈIS?



de Stefan MacGill

*Maljuna virino paŝas al la bileta giĉeto de stacidomo. La giĉeto estas fermita, ŝi frapas, kaj ĝi malfermiĝas.*

**Virino:** Bonan matenon, sinjoro. Ĉu vi bonvolos doni al mi informon?

**Biletisto:** Jes, certe, sinjorino. Kion vi deziras scii?

**Virino:** Kiam foriras la trajnoj al la nordo?

**Biletisto:** Al la nordo iras tri trajnoj hodiaŭ. La rapida trajno foriros post tri horoj, la malrapida post kvar horoj kaj la *tre* malrapida post ses horoj.

**Virino:** Bone, do ne ekiras trajno al la nordo ene de unu horo.

**Biletisto:** Prave. Ĉu vi deziras aĉeti bileton al la nordo?

**Virino:** Ne dankon. Sufiĉas la informo. Ĝis revido.

**Biletisto:** Ĝis revido, sinjorino. *(Li fermas la giĉeton, remetas siajn piedojn sur la tablon kaj eklegas denove sian krimromanon.)*

*(Dum minuto la virino paŝas tien kaj reen meditante. Fine, ŝi reiras al la giĉeto kaj frapas. La viro ĉesas legi kaj malfermas la giĉeton.)*

**Virino:** Pardonu min, sinjoro. Ĉu vi bonvolos doni al mi plian informon?

**Biletisto:** Jes, certe, sinjorino. Kion vi deziras scii?

**Virino:** Kiam foriras la trajnoj al la sudo?

**Biletisto:** Momenton, mi rigardos en mia trajn-libro *(Li prenas erare sian romanon)* Ha, la malĝusta libro, momenton... Jen la horaro *(Li legas la horaron)* La sudo?

**Virino:** Jes, trajnoj al la sudo. Ĉu ekiros trajno baldaŭ?

**Biletisto:** Ne, bedaŭrinde. Nur post sep horoj. La vespera trajno foriros je la sesa horo kaj la nokta trajno je la deka.

**Virino:** Kaj ne estas taga trajno al la sudo?

**Biletisto:** Bedaŭrinde, ne. Ĉu vi deziras bileton por la vespera trajno?

**Virino:** Ne dankon! Sufiĉas la informo. Ĝis revido.

*(La biletisto denove fermas la giĉeton, reprenas sian romanon, serĉadas la ĝustan paĝon kaj eklegas maldiligente. La virino paŝas tien reen kaj pensas. Denove ŝi paŝas al la giĉeto kaj frapas. La viro senpacience formetas la libron kaj malfermas la giĉeton).*

**Virino:** Pardonu min denove, sinjoro, sed...

**Biletisto:** Pli da informoj, sinjorino?

**Virino:** Jes, mi petas. Afable informu min pri la trajnoj al la okcidento.

**Biletisto:** Al la okcidento? Momenton, mi rigardos en mia horaro.

**Virino:** Mi dankas vin. Ĉu baldaŭ iros trajno al la okcidento?

**Biletisto:** Ne baldaŭ. Al la okcidento iras nur unu trajno tage. La hodiaŭa trajno jam foriris matene. La venonta trajno iros nur morgaŭ matene. Ĉu vi deziras bileton por morgaŭ?

**Virino:** Ne dankon! Sufiĉas la informo. Neniu trajno hodiaŭ. Ĝis revido!

**Biletisto:** Jes, mi timas. Ĝis baldaŭa revido!

*(La viro fermas la giĉeton, reprenas libron, remetas la piedojn sur la tablon kaj klopodas eklegi. Li serĉas la ĝustan paĝon tute sensukcese. Li erare prenis la trajn-horaron. Li ĉagrenite tion forĵetas, restariĝas, prenas la krimromanon, residiĝas kaj serĉas la ĝustan paĝon. Tuj kiam li trovas ĝin la virino frapas denove ĉe la giĉeto. Kolere, la viro flankenĵetas la romanon kaj malfermas la giĉeton.)*

**Virino:** Pardonu min denove, sinjoro. Estu afabla, mi petas...

**Biletisto:** *(kolere tra la dentoj)* Jes, afabla... afabla... kompreneble, afabla...

**Virino:** Kaj informu min pri la trajnoj...

**Biletisto:** ... al la oriento!!



Virino: Jes, precize! Pri la trajnoj al la oriento.

Biletisto: Al la oriento veturas kvar trajnoj tage. La unua jam foriris antaŭ tri horoj, la dua jam foriris antaŭ unu horo...

Virino: Kaj ĉu certe jam foriris? Ne malfruas?

Biletisto: Certe foriris. Ne malfruis. La tria trajno foriros post du horoj kaj la lasta foriros post ok horoj.

Virino: Do, ne iros baldaŭ trajno al la oriento?

Biletisto: Nur post du horoj.

Virino: Kaj ĉu certe nur post du horoj? Ĉu ĝi eble ne ekiros tro frue?

Biletisto: Certe ne. Trajnoj neniam ekiras tro frue! Do, ĉu mi rajtas vendi al vi bileton por la trajno post du horoj?

Virino: Ne, dankon, sufiĉis la informo!

Biletisto: Sed mi estas biletisto! La fervojo pagas min por vendi biletojn, ne por doni informojn!

Virino: Sed vi tion faras tiel afable!

Biletisto: Baf! *(Li fermas la ĝiketon, tuj la virino frapas sur ĝi, li malfermas ĝin denove)*

Virino: Trajno al la nord-oriento?

Biletisto: Nur venont-semajne.

Virino: Al la nord-okcidento?

Biletisto: Nur venont-monate.

Virino: Al la sud-oriento?

Biletisto: Nur venont-jare.

Virino: Al la sud-okcidento?



Al la sud-oriento?

**Biletisto:** Nur se oni iam konstruos fervojon tien.

**Virino:** Ne estas aliaj direktoj?

**Biletisto:** Ne estas aliaj. Bonvolu elekti el la sep direktoj. Kiun bileton mi povas vendi al vi?

**Virino:** Mi ne volas aĉeti bileton.

**Biletisto:** Sinjorino! Vi ne volas bileton, vi ne volas vojaĝi. Kial do vi demandas pri la trajnoj al la nordo, la sudo, la oriento, la okcidento, (*li svingas la manojn laŭ la direktoj*) la nord-okcidento, la nord-oriento, la sud-okcidento kaj la sud-oriento?

**Virino:** Ĉar mi volas esti certa, ke neniuj trajnoj foriras nun, ĉar mi volas sekure transpaŝi la relojn kun miaj anasoj, kaj mi ne volas esti trafita de trajno! Do, ni ĉiuj sekure transiros. Ĝis reveno, kara sinjoro!

*(Ŝi eliras, la viro frapas sian frunton pro ĉagreno. Dum li serĉas sian libron, ni aŭdas la bruon de rapida trajno, kiu alproksimiĝas kaj pasas laŭ- la kajo tuj apud la bileta oficejo. Post momento la virino kaj unu/du anasoj falas en la ĉambron en ŝokita stato. Evidente, la trajno preskaŭ trafis ilin.)*

**Virino:** Sinjoro! Kio estis tiu granda ruĝa kaj flava objekto, kiu preskaŭ trafis min? Tio ne estis papilio!

**Biletisto:** Tio ne estis papilio, sinjorino. Tio estis trajno. La ekspreso!

**Virino:** Sed mi demandis vin! Vi diris, ke neniuj trajnoj foriras nun!

**Biletisto:** Ĝuste, neniuj trajnoj foriras nun, sed precize nun alvenas la granda ekspreso el la ĉefurbo. Pri la alvenoj de trajnoj vi nenion demandis!

---

*Respondu al la demandoj:*

## Por kio oni uzas...

bileton? ombrelon? ĝiĉeton? trajnon? horaron? krimromanon? kalendaron? rapidan trajnon? malrapidan trajnon? afablecon? ... teleskopon? horloĝon? boaton? remilon? lagon? akvon? ruĝan farbon? sonorilon?

# KANTU!

## LA KORPO PER MUZIK'!

Melodio: Tradicia, angla, "Drinkejo estas en la urb'"

Vortoj originalaj, de Stefan MacGill.

Vizaĝo, kapo, naz' kaj buŝ' ... naz' kaj buŝ'

...naz' kaj bu...u...u..ŝ'!

Brako, kruro, piedo per la tuŝ,

Vizaĝo, kapo, naz' kaj buŝ' ... naz' kaj buŝ'.

Vizaĝo, kapo, naz' kaj buŝ'... naz' kaj buŝ', (x2)  
 Brako, kruro, piedo per la tuŝ',  
 Vizaĝo, kapo, naz' kaj buŝ'... naz' kaj buŝ'.

Orel', okulo, lang' kaj dent' ... lang' kaj dent', (x2)  
 Mano, fingro, ungo per la sent',  
 Orel', okulo, lang' kaj dent' ... lang' kaj dent'.

La kor', stomako, umbilik' ... umbilik', (x2)  
 Kolo, ŝultro, kokso per indik',  
 Kaj jen la korpo per muzik!



Sendu ĉian korespondadon  
rekte al la adreso:  
Josef Chvosta, Leninova 16,  
CS-29001 Podebrady



Ni volas paroli kun vi pri sporto kaj ludoj:

1. Kiujn sportojn vi praktikas kaj kiam?
2. En kiuj sportoj oni uzas pilkon?
3. Ĉu ĉiuj pilkoj estas samaj?
4. Skribu la regulojn de iuj sportoj, kiujn vi konas aŭ praktikas.
5. Kiel vi komprenas la terminojn: teamo, matĉo, turniro, ĉampiono, konkurso, konkuro, vetado, lotado, tombolo, hobia?
6. Pri kiuj sportoj aŭ ludoj oni jam skribis en *Juna amiko*?
7. Nomu glorajn sportistojn de via lando kaj tutmondajn ĉampionecojn de iuj sportoj.
8. Ĉu ekzistas poŝtmarkoj pri sporto kaj ludoj?

Se vi prirespondos la suprajn demandojn, eble via respondado estos inda (taŭga, konvena) por esti presita en la gazeto, ĉu sub "Klubo de legantoj", ĉu aliloke.

Gratulon al s-ano Petko Arnaudov el Pazarĝik, Bulgario, kiu respondis la demandojn en numero 37 de januaro 1986.

# SOLVOJ DE ENIGMOJ


Jen respondo pri la cifera kapo. kiu aperis sur paĝo 20 de la antaŭa numero. La vizaĝo estas naŭ, unu orelo estas tri, do du oreloj estas ses, la nazo estas ses, unu okulo estas ses, do du okuloj estas dek du, la buŝo estas unu, okulbrovo estas unu, do paro de okulbrovoj estas du, kaj la hararo estas naŭ. Sume, kvardek kvin.



Se vi estas brito, usonano, kanadano, nov-zelandano, aŭstraliano (alivorte, angla-lingvano), aŭ strangulo, vi eble opinias, ke la hararo, buŝo kaj okul-brovoj estas formitaj ne de la cifero "1" sed de la cifero "7". En tiu kazo la sumo de la vizaĝo ne plu estas kvardek kvin, sed cent dek sep!

Nun respondo al la bildo de paraj objektoj sur paĝo 21 de la antaŭa numero. Piro kaj pomo estas paro, ĉar ambaŭ estas fruktoj. Vek-horloĝo kaj brak-horloĝo estas paro, ĉar ili ambaŭ informas vin, ke vi malfruas. Trumpeto kaj tamburo estas paro, ĉar ili estas muzikiloj... aŭ bruiloj, se mankas lertaj muzikistoj. Krajono kaj peniko estas paro, ĉar ili estas skribiloj. Kulero kaj forko estas paro, ĉar ili estas manĝiloj. Raŭpo kaj papilio estas paro, ĉar la unua estas la ida formo de la alia. Martelo kaj tenajlo estas paro, ĉar eblas bati la fingron per ambaŭ. Ovo kaj kokido estas paro, ĉar ĉiu diskutas, kiu ekzistis unua.

Restas tri objektoj. Se vi opinias, ke la du maldekstraj objektoj estas ambaŭ fungoj, la dekstra objekto estas tiu, sen paro. Sed nun nia nova demando estas jena: Kio estas tiu objekto? Ĉu turbo, butono, telero vidata de sube, konfitaĵa torto kun tri migdalaj nuksoj meze, fluganta spac-ŝipo? Jen nova konkurso! Respondoj sur poŝt-karto ĝis la jar-fino! Premio por la plej originala respondo!



# ANKAŬ LA JUNULARA KONGRESO

## EKSTER- EŬROPE!

Malofte la junaj esperantistoj iras ekster Eŭropo por la Internacia Junulara Kongreso (IJK), sed ĉi-jare ĝuste tio okazis. La plej grava kongreso en 1986 de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) okazis en Hadassa Neurim, eta lerneja vilaĝo tuj apud la Mediteranea Maro en Israelo. Kvankam estis malpli da kongresanoj ol kutime, la kongreso bone sukcesis. La 105 gejunuloj ĝuis la abundan sunon kaj maron, la plenan programon interesan, la kvin manĝojn tage kaj la amikiĝon kun la aliaj kongresanoj.

Pro la (por eŭropanoj) ekzotika kongreslando, okazis tri ekskursoj dum la kongreso, unu al Jerusalemo, la antikva urbo plej sankta laŭ tri mond-religioj. Oni ankaŭ ekskursis al du arabaj vilaĝoj kaj al kibuco, kiu estas komunumo, kie la tuta vilaĝo funkcias kiel granda familio.

Okazis seriozaj prelegoj kaj labor-grupoj, kursetoj pri tri diversaj lingvoj (araba, hebrea kaj Esperanto), kaj kunsidoj de la gvidantoj de TEJO. Oni lernis naĝadon, israelajn popol-dancojn kaj novajn ludojn. Inter la vesperaj distraj programoj troviĝis nova teatraĵo "Pikniko en la kampo" prezentita de la teatra trupo de Germana Esperanto-Junularo (GEJ), "Kia koincido!"

La plimulto de la partoprenintoj venis al Israelo per aviadilo aŭ ŝipo, sed antaŭ ol foriri, multaj vizitis aliajn partojn de la lando. Oni organizis tri post-kongresajn ekskursojn: unu al la Maro de Galileo, unu al la Morta Maro kaj Massada, monto kun antikvaj historiaj ruinoj, kaj unu per buso al Egiptio. Tiel eblis vidi mirigajn lokojn kaj iomete pli-longigi la tempon kun geamikoj el diversaj partoj de la mondo.

*Joel Brozovsky, Usono*

---

Sur la dorsa kovrilo aperas interesa desegnaĵo de Soós Károly el Salgótarján, Hungario. Parolu pri la enhavo de la desegnaĵo!

## DEZIRAS KORESPONDI



- \* Esperanto-klubo "Norda stelo", ul. Zenina 9, u. Norilsk, SU-663301, Sovet-unio, deziras korespondi tutmonde pri diversaj temoj, kolektas bildkartojn kaj esperantaĵojn.
- \* Dominika Antonowicz, Zielony Rynek 4/3, woj. Leszno, PL-67-400 Warszawa, Pollando. 13-jara, deziras korespondi tutmonde, kolektas glumarkojn kaj poŝtkartojn.
- \* Buzokas Vidmantas, Gedimino g-ve nr. 11, bt 50, SU-235500 Mazeikiai, Litova SSR, Sovet-unio. 13-jaraĝa lernanto en mezlernejo, kōmencanto, serĉas geamikojn el la tuta mondo. Korespondos pri diversaj temoj, kolektas poŝtmarkojn pri naturo.
- \* Juĉkova Olesja, 15-jara, deziras korespondi tutmonde pri muziko, literaturo kaj aliaj temoj: str. Talnaŝkaja 21-49, SU-663305 u. Norilsk, Sovet-unio.
- \* Pomanova Ĵanna, 16-jara, deziras korespondi tutmonde pri literaturo, sporto, muziko, la vivo kaj aliaj temoj.

### LERNANTOJ!

*Iru al'via instruisto kaj demandu : Ĉu vi scias, kio estas IPR? Se la respondo estas "Ne!", diru laŭte:*

## INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

*Ĝi estas revuo, kiu aperas 3-foje jare speciale por instruistoj de Esperanto. Ĝin eldonas Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Ĝi estas plena je utilaj artikoloj kaj novaĵoj pri la renkontiĝoj de ILEI, ekzemple pri la tut-semajna 4a Metodika Seminario, kiu ĵus okazis en Gárdony, Hungario, komence de oktobro.*

Jarabono kaj membreco en ILEI kostas 40 svedajn kronojn: pĝk 682117-7 (Stockholm), ILEI, Södra Rörum, pl. 455, S-242 00 Hörby, Svedio.

A BA BELI ZÜRZAVAN  
LEGE MORRATIK  
MEGOLDASA-  
ESPERANTO

1987  
CENTARA  
GUBILEO  
DE  
ESPERANTO

ESPERANTO  
POR  
PACO

LAVAR LAJO  
ZAMENHO

Dr Esperanto  
INTERNACIA  
LINGVO  
1887

